

La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-16

n-ro 357

15 000 sciencistoj alarmas pri difektado de la planedo



Tertremo kaŭzis al Irano
US\$450mln-ojn damaĝe

Ĉina superkomputilo
denove metis sur sin la
kronon de la monde plej
rapida kalkulmaŝino

Nia grumblema tero kaj
kiel ĝi evoluas

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



15 000 sciencistoj alarmas pri difektado de la planedo

Urĝeco protektadi la medion kaj ekosistemon p. 03

Tertremo kaŭzis al Irano US\$450mln-ojn da damaĝe

La sumo kreskos kun enkalkulo de perdoj de publikaj instalaĵoj p. 04

Ĉina superkomputilo denove metis sur sin la kronon de la mondo plej rapida kalkulmaŝino

La 500 plej potencaj superkomputiloj p. 05

Nia grumblema tero kaj kiel ĝi evoluas

La tero sub ni ŝajnas fiksita, sed la malo veras p. 06

Bill GATES aĉetis terenon cele al starigo de inteligenta urbo

80 milionoj da usonaj dolaroj p. 09

La unua brazila imperiestrino

Altrangulo sentema pri la bezonoj de la popolo p. 10

Hodiaŭe

Jónas HALLGRÍMSSON; José SARAMAGO; Karel Hynek

MÁCHA p. 11

15 000 sciencistoj alarmas pri difektado de la planedo

Tio estas vera alarmkrio. Pli ol 15 000 sciencistoj lanĉis averton pri la urĝeco protekti la medion kaj ekosistemon de la planedo. Laŭ ili, la minacoj pligraviĝas, kaj la homaro ne reagas.



Dudek kvin jarojn post unua averto de plimulto el la laŭreatoj de la Nobelpremio, pli ol 15 000 sciencistoj el 184 landoj lanĉas, en deklaro publikigita pasintan lundon [13 nov 2017], averton fronte al la riskoj de malstabiligo de la planedo, se neniuj agado okazas por protekti la medion kaj ekosistemon.

En 1992, la NRO «*Union of Concerned Scientists*» [Unio de maltrankviliĝintaj sciencistoj], kun pli ol 1700 kunsubskribintoj, jam elsendis «Averton de tutmondaj sciencistoj al la homaro», en kio ili argumentis, ke la efiko de la homaj aktivaĵoj kontraŭ la naturo verŝajne okazigos «grandajn homajn suferojn», kaj «kripligos la planedon el neinversigebla maniero».

Kvaronon de jarcento poste, tiuj sciencistoj revizias la originan averton en artikolo, kiun ili nomas «dua averto».

Manko de trinkebla akvo, senarbarigo, malkresko de la nombro de mamuloj, emisioj de forcejefikaj gasoj: ĉiuj ĉi indikiloj ruĝiĝas, kaj la respondoj de post 1992 estas seniluziigaj, krom

internaciaj aranĝoj prenitaj por stabiligi la ozonan tavolon en la stratosfero, konkludas la sciencistoj, kies alvoko aperis en la revuo BioScience (vidu).

«La homaro ne plenumas la urĝajn agadojn por savi la minacitan biosferon», juĝas la aŭtoroj de la deklaro.

«En tiu dokumento, ni ekzamenis la evoluadon de la situacio en la du lastaj jardekoj, kaj taksis la homajn respondojn, analizante la ekzistantajn oficialajn datumojn», eksplikas Thomas NEWSOM, profesoro ĉe la Universitato Deakin en Aŭstralio, kaj kun-aŭtoro de la deklaro. «Estos baldaŭ tro malfrue por inversigi tiun danĝeran tendencon», li emfazas.

La sciencistoj opinias, ke plimultego el la minacoj supre menciitaj daŭras, kaj ke «plejparte el ili eĉ pligraviĝas», sed tiuj tendencoj estas ankoraŭ inversigeblaj tiamaniere, ke la ekosistemoj reakiru sian daŭripovecon.

De 25 jaroj, la kvanto de trinkebla akvo disponebla en la mondo por unu

persono malaltiĝis je 26% kaj la nombro de mortintaj areoj en la oceanoj kreskis je 75%.

La alvoko ankaŭ mencias perdon de preskaŭ 120,4 milionoj da hektaroj da arbaroj plejparte transformitaj al agrikulturaj teroj, signifan kreskadon de karbona dioksido (CO₂), kaj de la averaĝaj temperaturoj de la planedo.

La sciencistoj ankaŭ emfazas la kreskon de 35% de la tutmonda loĝantaro, kaj malaltiĝon je 29% de la nombro de mamuloj, de reptilioj, amfibioj, birdoj kaj fiŝoj.

Inter la rekomenditaj aranĝoj, la aŭtoroj de la alvoko sugestas kreadon de pli

granda nombro de naturaj rezervejoj, teraj kaj maraj, plifortigon de la leĝoj kontraŭ kaŝĉasado, kaj pli severan agadon kontraŭ la komerco de sovaĝaj produktaĵoj.

Por bremsi la demografian kreskon en la evolulandoj, ili rekomendas pli grandan ĝeneraligon de la famiplanado, kaj programojn de klerigado de la virinoj.

La sciencistoj pledas ankaŭ favore al aranĝoj, kiuj kuraĝigas nutroreĝimon bazitan sur pli da plantoj, kaj grandskalan adopton de renoviĝantaj energioj kaj aliaj ekologiaj teknologioj.

Neniam Milito Inter Ni

Tertremo kaŭzis al Irano US\$450mln-ojn damaĝe

Irana loka registaro marde [14 nov 2017] publikigis la rezultojn de la unua taksado, dirante, ke la fortega tertremo, kiu dimanĉe trafis la iraka-iran landliman regiono, kaŭzis

al Irano proksimume 450 milionojn da usonaj dolaroj da damaĝoj.

La irana novaĵ-agentejo *Tasnim* raportis, 2017-11-16



ke laŭ raporto de la irana provinco *Kermanshah*, pli ol 11 000 domoj estis faligitaj en la kamparo, kaj 5 000 domoj

estis komplete detruitaj en urboj, kaj la rektaj perdoj kalkuliĝas al proksimume 450 milionojn da usonaj dolaroj. La raporto diris, ke la sumo kreskos kun enkalkulo de perdoj de publikaj instalaĵoj.

Yu

Ĉina Radio Internacia

Ĉina superkomputilo denove metis sur sin la kronon de la monde plej rapida kalkulmaŝino

La 13an de novembro estis publikigita la plej freŝa listo de la 500 plej potencaj superkomputiloj. En ĝi ĉinaj superkomputiloj *Sunway TaihuLight* kaj *Tianhe-2* okupis respektive la unuan kaj duan lokojn por la kvara fojo sinsekve.

La listo estas eldonita en ĉiu sesa monato. Ĉi-foje la ĉinaj superkomputiloj *Sunway TaihuLight* kaj *Tianhe-2* okupis plu la plej suprajn lokojn per kapablo de 93 petakloj kaj 33,9 petakloj en ĉiu sekundo. Usono ne aperas en la antaŭaj tri lokoj por sinsekvaj du fojoj. Antaŭ ses monatoj la superkomputilo *Titan* el Usono estis venkita de *Piz Daint* el Svislando kaj falis al la kvara loko, kaj ĉi-foje *Gyokou* el Japanio superis ĝin, kaj ĝi nun estas en la kvina loko.

Laŭ fakulo pri komputado, la usona departemento pri energio subtenas konstruadon de du novaj superkomputiloj, *Summit* kaj *Sierra*. La kalkul-kapablo de *Summit* estos duoble pli rapida ol tiu de *Sunway TaihuLight* kaj ĝi estos ekuzita venontjare laŭ prognozo. Usono esperas denove havi la monde plej rapidan superkomputilon post ses monatoj.

Laŭ nombro de kalkulmaŝinoj en la listo, en junio pasintjare Ĉinio unuafoje superis Usonon, kiu longtempe okupis la unuan lokon, per malgranda avantaĝo de 167 kontraŭ 165; en novembro pasintjare la du landoj posedantaj po 171 kalkulmaŝinojn okupis la unuan lokon; kaj en junio ĉijare Usono superis Ĉinion kaj okupis la



unuan lokon per 169 kontraŭ 159.

Pri fabrikoj, la ĉina fabriko *Inspur* distingiĝis, ĉar la nombro de ĝiaj kalkulmaŝinoj pliiĝis de 20 antaŭ ses monatoj al 56 ĉi-foje, okupante la trian lokon inter komputilaj fabrikoj.

LIU Jun, ĉefo de la sekcio pri altkvalitaj serviloj el *Inspur*, diris, ke Ĉinio elspezis multe por superkomputiloj en la lastaj jaroj, kaj servoj de altkvalita kalkulo de ĉi-rilataj fabrikoj rapide disvolviĝas. La esplorinstitutoj kaj fabrikoj de Ĉinio atentigas teknikan novigon de siaj produktoj, kaj pro tio grandskale pliiĝas ilia konkurenckapablo.

LIU Zijia
El Popola Ĉinio

Nia grumblema tero kaj kiel ĝi evoluas

La tero sub ni ŝajnas fiksita, sed la malo veras. Nia planedo konstante ŝanĝiĝas.

La Tero estas kiel neniu alia mondo en nia sunsistemo. Ĝi estas la sola planedo kun oceanoj da likva akvo sur la surfaco. Ĝi havas montojn kaj valojn, marojn, dezertojn kaj glacieron. Tiu

grandega diverseco estas plejparte la rezulto de geologiaj faktoroj. Kontinentoj ĉiam moviĝas kaj interagas, kio influas kiel ili aspektas. Novaj montoj blokas nubojn kaj la pozicio de la kontinentoj influas marfluojn, kiuj dividas la sunan varmon trans la Tero. Ni multe al kutimiĝis al tiuj kondiĉoj, kaj instruas ilin ĉie en la mondo, sed antaŭ cent jaroj, sciencistoj ankoraŭ primokis la ideon.

La nomo Alfred Lothar WEGENER estas por ĉiam ligita al la evoluo de la surfaco. Li estis Germana sciencisto kun multaj talentoj, nome astronomio, meteorologio kaj geologio. Dum longa parto de sia profesia vivo, li esploris Gronlandon kaj kreis stacion por mezuri la veteron en la ekstrema medio. Li vojaĝis tien plurajn fojojn, ĝis li reiris por instrui en la universitato. Ŝajnas ke liaj lecionoj estis tre popularaj, pro tio ke li bone kapablis klarigi malfacilajn temojn simple. Malgraŭ tio ke li estis bonega meteorologo, lia plej influa malkovro estis en la fako de geologio. Kiam li rigardis la mapon de la mondo en 1910, Li rimarkis ke la okcidenta marbordo de Afriko preskaŭ perfekte

kongruas kun kontraŭ la orienta marbordo de Ameriko. Estis kvazaŭ la du estis puzzlepecoj de pli granda kontinento. WEGENER ne estis la unua persono kiu rimarkis la similecon inter la marbordoj de

malsamaj kontinentoj, sed li ja estis la unua, kiu liveris sciencajn pruvojn.


- Oni povas trovi fosiliojn de la samaj bestoj en malsamaj kontinentoj, kvankam tiuj bestoj neniel povintus transiri

oceanon. Tio indikas ke iam la kontinentoj estis konektitaj per tero.

- Oni povas trovi rokojn en Afriko kaj Sud-Ameriko kiuj havas la saman aĝon kaj la samajn kvalitojn, kio montras ke ili havas la saman fonton.

- Karbo formiĝas el organika materialo sub alta premo, sed tiu procezo nur eblas en varmaj klimatoj. Malgraŭ tio, Antarktio ja havas karbon, kio montras ke tiu kontinento iam troviĝis pli proksime al la ekvatoro.

La pruvoj kiujn li proponi estis bonaj, sed granda plejparto el liaj kolegoj ne kredis lin. Tio estis plejparte pro tio ke WEGENER ne kapablis elpensi bonan meĥanisman por klarigi kio movas la kontinentojn. Li ja elpensis ke la fenomeno povus esti konsekvenco de tajdaj fortoj, aŭ de centrifugaj fortoj, sed tiuj meĥanismaj ne estas kredeblaj. En 1960, post dek jaroj, la scienca komunumo finfine akceptis la ideojn de kontinenta ŝoviĝo kaj antikva superkontinento, sed WEGENER ne povis ĝui




tion. Li mortis en 1930 en Gronlando pro koratako, kiam li vojaĝis inter du sciencaj stacioj.

WEGENER neniam eltrovis ekzakte kial la kontinentoj moviĝas, sed nun ni scias ke tio estas la rezulto de multaj faktoroj. Kiam la Tero formiĝis, ĝi estis tre varma kaj konstante bombardata de aliaj objektoj. La surfaco estis oceano de fandiĝantaj rokoj kaj kvankam maldika krusto provis formiĝi, ĝi tuj fandiĝis post la sekva meteorito. Post longa periodo da kosma perforto, la sunsistemo komenciĝis trankviliĝi. Tiam la krusto havis ŝancon por malvarmiĝi kaj rapide kreskis. Finfine la surfaco estis sufiĉe malvarma por surhavi akvon. Unue ne estis grandaj altecdiferencoj sur la tero, do preskaŭ la tuto de la planedo estis subakvigita. Nur ekzistis etaj videblaj insuloj en giganta oceano. Tio ne estis la fino tamen. La krusto estis ankoraŭ juna kaj kuŝis sur varmega profundo.

La Tero enhavas tri ĉefajn tavolojn: la kernon, mantelon kaj kruston. La parte fandita kerno konsistas el varmegaj metaloj kaj la mantelo el roko kiu ne estas likva, sed pro la alta temperaturo kaj premo ja estas facile deformebla. La altaj temperaturoj pli profunde en la Tero estas parte konservitaj de ĝia varma komenco kaj parte estas la rezulto de la defalo de radioaktivaj elementoj. Tiu energio devas iri ien, kio kaŭzas fluojn ene de la Tero. Varma materialo volas iri supren, pro tio ke ĝi estas malpli densa ol ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Pli supre la

temperaturoj estas malpli altaj kaj la materialo iras profunden denove. Tio kaŭzas rondirojn de materialo kaj energio sub la krusto. Tiu moviĝo tiras la kruston en diversajn direktojn. La rezulto estas grandaj tektonikaj platoj (Tektoniko venas de la Greka vorto [τεκτονικός, tra la latina

‘tectonicus’] por ‘rilata al konstruado’] - . En geologio ĝi referas al la konstruiĝo de la surfaco), kiuj moviĝas kaj interagas. Kiam du platoj moviĝas disen, la varmega ŝtono el la mantelo iras supren kaj malvarmiĝas pro la




akvo. Tiel nova krusto estas kreata. En aliaj lokoj oceana plato renkontas kontinenton kaj estas puŝata sub ĝin, aŭ du maraj platoj renkontiĝas kaj batalas pri kiu iras suben, sed kontinentaj platoj ĉiam venkas oceanajn platojn. Ke tiu meĥanismo funkcias estis pruvita kiam oni malkovris longan suboceanan montaron kiu komenciĝas kelkajn centojn da kilometroj for de la norda Poluso, iras suben rekte tra Islando kaj finiĝas proksime al Antarktio. Ĝi estas la plej longa montaro de la mondo kaj nomiĝas la Mezatlantika Dorso. Tamen la maniero per kiu ĝi formiĝis estas la malo de tiu de kontinentaj montoj. Tiuj kreiĝas kiam du kontinentaj platoj renkontiĝas kaj premas la rokojn kune. Ekzemplo de tio estas la Himalajo, kiu estas la rezulto de interagoj inter la Eŭroazia kaj Hindia plato. La kontinentoj do influigas de la fluoj en la mantelo, sed ili parte regas sian propran sorton. Ekzistas platoj kiuj pli rapide moviĝas ol la mantelo sub ili. Ekzemplo de tio estas la plato Nazca, oceana plato kiu ŝoviĝas sub Sud-Amerikon kaj tiel kreas la

Andoj. La parto de la plato kiu jam ŝoviĝis suben kuntiras la reston de la plato, kio igas ĝin plirapidiĝi. Aliflanke ĝi ankaŭ blokas la fluon de la mantelo sub ĝi kaj puŝas la varmegan rokon suben. Tiuj efikoj kombine kaŭzas ke la plato moviĝas 10cm jare, dum la mantelo fluas nur 5cm jare.

Oni ne nur povas identigi platlimojn surbaze de submaraj montaroj. La limoj de la platoj estas tiom forte ligitaj al katastrofoj, ke oni povas trovi ilin simple per desegni la lokojn de vulkanoj kaj tertremoj sur mapon. Tertremoj povas okazi en la mezo de kontinento, sed 95% el ili okazas ĉirkaŭ la faŭlto, kie du tektonikaj platoj frotas unu la alian. Kutime tiu frotado okazas tre malrapide kaj kaŭzas nur etajn tremojn kiujn oni apenaŭ sentas. En aliaj kazoj la platoj fiksiĝas kaj ne plu povas moviĝi. La premo grandiĝas ĝis unu el la platoj ne plu eltenas. Tiam la plato rompiĝas, kio liberigas multe da energio. Tio kaŭzas fortegajn tertremojn kun multe da damaĝo. Okazas ofte ke tiuj tertremoj okazas en la maro, kio povas kaŭzi tre altajn ondojn, kiuj nomiĝas cunamoj. Cunamoj kaj fortaj tertremoj estas relative oftaj ĉirkaŭ la tuta Pacifiko, specife ĉe la Azia flanko. La rondo, kiu komenciĝas en Aŭstralio, iras laŭ Azio al Ameriko, havas 452 vulkanojn, el kiuj 128 estas aktivaj kaj 62 estas konsiderataj danĝeraj. Tial la randoj de la Pacifika plato ankaŭ estas nomataj la "Pacifika fajra rondo".

Platotektoniko sendube estas la ĉefa faktoro kiu influas la geologion de la Tero, sed en nia sunsistemo estas multaj aliaj mondoj. La kvar planedoj kiuj estas plej proksimaj al la Suno estas rokaj. La planedoj en la eksteraj

regionoj de la sunsistemo konsistas pleje el gaso kaj glacio kaj funkcias tute malsame ol la Tero. El la plej proksimaj planedoj, Merkuro estas malplej interesa. Ĝi estas tre eta kaj tro rapide malvarmiĝis por esti geologie aktiva. Ankaŭ Marso ne montras multan aktivecon. Ĝia plej granda vulkano,



[Monto Olimpo], estas kun pli ol 25km la plej alta monto en la sunsistemo, sed ĝi kaj ĉiuj aliaj vulkanoj de Marso estas jam dum longa tempo mortaj. Olympus Mons ne estas la konsekvenco de platotektoniko, ĉar Marso ne havas platojn. Anstataŭe, la vulkano naskiĝis same kiel tiuj de Havajo. Varmaj punktoj en la Termantelo foje erupcias kaj formas vulkanajn insulojn, sed la moviĝo de la krusto

forpuŝas la insulojn de la punkto, kio mortigas la vulkanojn. Sur Marso la krusto ne moviĝas, kio donis al la vulkano milionojn da jaroj por kreski. Ankaŭ Venuso havas geologian historion. La planedo provis ekigi platotektonikon, sed ne sukcesis, pro tio ke la krusto estis tro dika. Venuso ja havas vulkanojn kaj lafofluojn. Tre interesa diferenco estas ke kontraste al la Tero, kiu havas ŝtonojn el ĉiuj epokoj, la tuto de la Venusa surfaco estas same aĝa. La konkludo estas ke antaŭ 500 milionoj da jaroj, la tuta surfaco de Venuso estis renovigita. Venuso estas ankaŭ la planedoj kun plej da vulkanoj. El la 1600 la plejparto estas morta tamen.

Kvankam la ekstera parto de la sunsistemo ne havas rokajn planedojn, ĝi ja povas esti interesa al geologoj. La lunoj de foraj planedoj estas multe pli aktivaj ol ili ŝajnas. Unu ekzemplo estas Titano, la plej granda luno de Saturno kaj la sola luno kun densa

atmosfera. Kiam la Cassini-sondilo vizitis la lunon, ĝi eltrovis multon pri la geologio, kiu similas al tiu de juna Tero. La plej granda diferenco inter Titano kaj la Tero estas la temperaturo. Ĝi estas multe tro malvarma por subteni likvan kernon, sed sciencistoj kredas ke la surfaco povas tamen resti aktiva per glaciaj vulkanoj, kiuj funkcias per akvo kaj amoniako anstataŭ lafo. Ankaŭ aliaj lunoj en la sunsistemo montras signojn de subteni glaciajn vulkanojn. Tamen la manko de sunlumo ne signifas ke foraj mondoj nepre estu glaciaj. La gravito de grandaj planedoj streĉas la rokojn ene de la lunoj, kio varmigas ilin. Tiu varmo sufiĉas por subteni oceanojn da likva akva akvo sub la surfaco de la lunoj. Oni pensas eĉ ke Eŭropo, luno de Jupitero, havas multe pli da likva akvo ol la tuta Tero. Sur Ioo25, la luno kiu plej proksime ĉirkaŭiras Jupiteron, la tajdaj efikoj estas tiom fortaj, ke la luno povas subteni lafajn vulkanojn. La lafo konstante renovigas

la surfacon, kio kaŭzas ke oni ne vidas la spurojn de pasintecaj meteoritoj. La luno havas pli ol 400 aktivajn vulkanojn, sur surfaco kiu estas malpli vasta ol centono de tiu de la Tero. Ĝi sendube meritas la titolon de plej aktiva astro en la sunsistemo.

La Tero ne estus sama sen tektoniko kaj kvankam la ŝanĝiĝoj ŝajnas ignoreble etaj dum homa vivo, ili estas drastaj kompare al la vivo de la Tero. Platotektoniko decidis kiel la surfaco de la Tero aspektu dum miliardoj da jaroj kaj ebligis vivon, sed kvankam ĝi donis komfortajn kontinentojn kiel loĝlokon, ĝi restas senkompata. Oni neniam scias kie la sekva katastrofo okazos. Gravas ke ni respektu la Teron kaj provu kompreni ĝin, por ke ni povu kiel eble plej longe ĝui ĝin.

Frank VAN HERTROOIJ
scivolemo.wordpress.com
Kun subteno de ISAE

Bill GATES aĉetis terenon cele al starigo de inteligenta urbo

La fondinto de la firmao Mikrosofto, Bill GATES, investis ĉirkaŭ 80 milionojn da usonaj dolaroj je aĉeto de terpeco da 25 mil akreoj (pli ol 100 mil kvadratkilometroj) en la usona subŝtato Arizono, por konstrui ian inteligentan urbon.

Tiu loko meze de dezerto estas 45 minutoj for de Fenikso, kiu estas la regurbo kaj la ĉefa urbo de Arizono.

La kreota komunumo nomiĝos “Belmont”, alude al la investfirmao de GATES nome *Belmont Partner*, kiu estas kunfaranto en tiu projekto, kiu enhavos 80 mil loĝejojn – tiom sufiĉus por loĝado de ĉirkaŭ 182 mil homoj.



Oni planas, ke la urbo ĉion havu por iĝi loko inteligenta, plena je teĥnikaro. Tie estos rapida interreto, memregaj aŭtomobiloj kaj “interreto de la aĵoj”. *Belmont Partners* ankoraŭ ne indikis

tiam, kiam komenciĝos la konstruado.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

La unua brazila imperiestrino

En ĉi tiuj lastaj semajnoj de la jaro 2017, brazilanoj rememoras, post 200 jaroj, la alvenon en Brazilo de ĝia unua imperiestrino, Caroline Josepha LEOPOLDINE Franziska Ferdinanda von Österreich, filino de la aŭstra imperiestro FRANCISKO la I-a. Ŝi alvenis en Rio-de-Ĵanejro en novembro 1817. Eble tiu momento en la brazila historio interesas precipe brazilanojn, sed la vivo de LEOPOLDINA estis tiom eventoplena, ke ankaŭ al alilandanoj probable plaĉos iom scii pri tio.

Kiam ŝi alvenis, ŝi estis apenaŭ 19-jara – kaj jam dokumente edzinigita al PETRO, la tiama reganto en Brazilo, kiel reprezentanto de la portugala regno. Sian edzon ŝi neniam estis vidinta, ĝis la alveno. En Rio, la vivo estis tre malsama ol tiu, kiun ŝi spertis en la aŭstra kortego. En Eŭropo, ŝi travivis lukson kaj ĉeeston de kleruloj kaj eminentuloj. Onidire, ŝi interparolis kun MOZART, GOETHE kaj similaj homoj. Ŝi ricevis bonan edukon kaj parolis plurajn lingvojn. Adaptiĝo al nia sudamerika lando estis por ŝi peniga kaj suferiga.

Tamen, LEOPOLDINA rapide maturiĝis kaj fariĝis grava persono en la loka politiko. Ŝi havis intensan temperamenton kaj influis la decidojn de sia edzo. Dekomence, ŝi konvinkiĝis, ke Brazilo devas liberiĝi de Portugalujo, kiu agadis rilate la kolonion troekspluateme kaj arogante. Ŝi kompatis la suferadon de la popolo kaj estis unu el la unuaj voĉoj pledantaj kontraŭ sklaveco. Ŝi

defendis la ideon, ke oni devas ne nur liberiĝi la sklavojn, sed krome transdoni al ili terpecojn por vivtenado. Malgraŭ tio, abolo de sklaveco plenumiĝis en Brazilo nur post longa tempo.

Oni preskaŭ ne atentis la fakton, ke la sendependiĝon de Brazilo efektive subskribis la imperiestrino. En momento,

kiam ŝia edzo vojaĝis por kvietigi agitadon en la provinco San-Paŭlo, ŝi restis en la tiama ĉefurbo, Rio-de-Ĵanejro, kiel lia anstataŭanto. Okazis tiam politika krizo kaj ŝi subskribis deklaron pri sendependeco. Post kelkaj tagoj, PETRO nur konfirmis ŝian agon, je la 7-a de septembro 1822, kaj fariĝis Imperiestro PETRO la I-a. Kaj la tuta gloro restis ĉe li!



LEOPOLDINA mortis nur 29-jaraĝa. Ŝi multe suferis en Brazilo. Ŝi havis sep gefilojn kaj du abortojn. Ŝian morton ŝajne kaŭzis komplikaĵo de gravedeco. Ŝia kunvivado kun Petro estis tumulta kaj dolora, ĉar li skandale tenis amantinon, kiu ricevis nobelan titolon: Markizino de Santos. Historiistoj ĝenerale asertas, ke la imperiestro kruele traktis sian edzinon. La vivon de LEOPOLDINA pritraktis diversaj libroj kaj filmoj.

Malgraŭ sia nelonga vivo, imperiestrino LEOPOLDINA lasis al brazilanoj simpatian impreson. Ŝi estis altrangulo sentema pri la bezonoj de la popolo.

Paŭlo Sergio VIANA
Esperanta Retradio



Jónas HALLGRÍMSSON

Jónas HALLGRÍMSSON (16-a de novembro 1807 en *Hraun en Öxnadalur* – 26-a de majo 1845 en Kopenhago) estis islanda poeto kaj sciencisto. Li estis la plej renoma poeto de la islanda romantikismo en la 19-a jarcento.


En Esperanto aperis: *La knabino en la turo*; *La insuleto de Gunnar*; *El amuzletero* (kiam la brita reĝino vizitis la francan reĝon).

Vikipedio

José SARAMAGO

José de Sousa SARAMAGO (naskiĝis la 16-an de novembro, 1922, mortis la 18-an de junio, 2010) estis portugala verkisto. En 1998 la Nobel-premio pri literaturo kronis lian karieron: neniuj verkistoj parolanta de la portugala lingvo antaŭe ricevis tiun distingon.

En Esperanto aperis: *Memorlibro pri la konvento*; *Rakonto pri Nekonata Insulo*.



Vikipedio



Karel Hynek MÁCHA

Karel Hynek MÁCHA [KArel HInek MA:ĥa] (naskiĝis la 16-an de novembro 1810 en Prago, mortis la 6-an de novembro 1836 en *Litoměřice*) estis ĉeĥa poeto, la plej elstara reprezentanto de la ĉeĥa romantikismo en la unua duono de la 19-a jarcento.

En Esperanto aperis: *Majo*.

Vikipedio